

Cl.- Atentu esperantistoj ! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas Claude Gacond kaj Andrée Gacond.

Romain Rolland, verkisto ŝatata de la esperantistoj, naskiĝis en Clamecy la 19-an de januaro 1866.

A.- Romain Rolland aŭdigis el Svislando siajn alvokojn al supernaciismo. Dum longaj jaroj li vivis ĉe la bordo de la Lemana aŭ Ĝeneva Lago kaj estas la gazeto *Journal de Genève*, kiu aperigis lian faman artikolon *Super la batalo*.

Cl.- Do estas nature, ke la **Jaro Romain Rolland** estu celebrata en Svislando, iomete kiel se tiu verkisto estus mem sviso. Tiu celebrado komenciĝis la tagon de lia centjariĝo en La Chaux-de-Fonds.

A.- Sinjoro Pierre Hirsch, la prizorganto de la Centro Edmond Privat, muntis en tiu urbo tre interesan ekspozicion, kiu montras diversflankajn aspektojn de la penso kaj agado de Romain Rolland.

Cl.- Tiu manifestacio permesas al vasta publiko malkovri la riĉecon de la dokumentaro troviĝanta en tiu Centro Edmond Privat. Nia samideano estis intima amiko de la granda franca verkisto. Pro tio ekzistas interesa korespondado inter ambaŭ mondcivitanoj. Sinjoro Pierre Hirsch nun pretigas libron pri tiu korespondado inter Edmond Privat kaj Romain Rolland.

A.- Sed Romain Rolland havis kontaktojn kun multaj aliaj svisoj. Inter tiuj kontaktoj la ekspozicio muntita en La Chaux-de-Fonds prezentas tiujn, kiuj ĉefe rilatas al la neŭŝatela vivo. Ni povas konstati, ke inter la neŭŝatelaj respublikanoj kaj la respublikano Romain Rolland ekzistis pli ol simpatio, sed eĉ leteraj interŝanĝoj.

Cl.- Grandaj portretoj prezentas la grandajn pens-inspirantojn de Romain Rolland. Rousseau, Beethoven, Tolstoj, Péguy kaj Gandhi ludis gravan rolon en la vivo de la defendanto de la popola teatro, de la muzikisto, de la homarano kaj poeto.

A.- Leteroj pruvas kontaktojn kun multaj aliaj pensuloj. Oni eĉ malfacile komprenas, kiel kontraŭaj tendencoj povis pace kunvivi en tiu verkisto. Ĉu li ne estis ekzemple la amiko de Gorki kaj de Paul Claudel ?

Cl.- Pro tiu diverseco Romain Rolland estis ofte kritikata de siaj amikoj, kiuj ne povis kompreni lian spiritan riĉecon. Ekzamenante tiun korespondadon oni estas frapata de la zorgo, per kiu Romain Rolland respondis al ĉiu korespondanto. Li ekzemple sendis plurpaĝan leteron al nekonata gimnaziano de La Chaux-de-Fonds, kiu devis prezenti al siaj kamaradoj la aŭtoron de *Jean-Christophe*.

A.- Tiu disponeblo faris, ke iom post iom Romain Rolland povis esti nomata la **Konscienco de Eŭropo** aŭ **La plej granda Mondcivitano**. Pro tio antaŭ 50 jaroj la Sveda Akademio donis al li la **Literaturan Nobel-Premion**.

Cl.- Hodiaŭ ni konstatas la pravecon de tiu premiado. Romain Rolland montriĝas iom post iom kiel unu el la plej gravaj pens-gvidantoj en la eŭropa historio. Lia korespondado povos eble nur esti komparata kun tiu de Voltaire, tiom gigantas la leter-nombro, sed ankaŭ la pritraktitaj temoj. Verŝajne ĉio naskiĝanta en lia epoko atingis lin. Dum ekzemple la plej multo el la verkistoj ignoris nian lingvon kaj movadon, li verkis belegajn paĝojn pri esperanto. Pri tiu temo ni parolos foje dum alia elsendo.

A.- La letera kariero de Romain Rolland havas tre belan naskiĝon. Pri ĝi rakontas kortuŝe Stefan Zweig en sia biografio *Romain Rolland, la homo kaj la verko*. Kiel ĉiu junulo Romain

Romain Rolland
Claude Gacond, 128-a radioprelego, 1966.03.16 & 1966.03.19

Rolland faris al si multajn demandojn. Li sentis sin altirata de la arto, sed samtempe ĝenata de la kontraŭartaj kritikoj de Leo Tolstoj. Kian profesion ekpraktiki ?

Cl.- La dudekdujarulo skribas unu vesperon siajn dubojn al la granda rusa verkisto. Li ne atendas respondon. La semajnoj forpasas. Kaj unu tagon li trovas sur sia labor-tablo paketon el Rusujo. Kio estas tio ?

A.- Estas la respondo de Leo Tolstoj. Leterego tridekpaĝa redaktita en la franca dum longaj tagoj fare de la admirata verkisto.

Cl.- Tiu letero datita de la 14-a de oktobro 1887 estis publikigita poste de Péguy en la revuo *Cahiers de la Quinzaine*. Ĝi komenciĝas tiel ; « *Kara frato, mi ricevis vian unuan leteron. Ĝi kortuŝas min. Mi legis ĝin larmojn en la okuloj.* »

A.- En tiu letero Tolstoj provas klarigi al tiu nekonata junulo siajn ideojn pri la Arto. Por li nur havas valoron Arto, kiu kontribuas al la unuigo de la homoj ; la vera artisto oferas sian vivon por siaj konvinkoj ; la kondiĉo al vera alvokiĝo ne estas la amo al Arto, sed la amo al la Homaro.

Cl.- Tiuj ideoj certe havis grandan influon sur la junulon. Lia posta senĉesa batalado homarana estas grandparte influata de la tolstoja mondbildo.

A.- Sed kio plej emociigis tiam Romain Rolland, tio estas, ke Leo Tolstoj estis dediĉinta tiom da tempo, eble plurajn tagojn, al la verkado de tiu respondo. Li decidis fari la samon. El tio lia disponeblo.

Cl.- Stefan Zweig diras : « *La konsoliga tolstoja letero, naskante nenombreblajn leterojn ĉe Romain Rolland, havas tiel daŭran efikon trans la tempo per novaj konsoloj.* »

A.- Stefan Zweig ankoraŭ diras : « *Historio malofte pruvis per pli bela ekzemplo, ke atomo da forto, en la morala mondo kiel en la fizika mondo, neniam estas perdita. La horoj oferitaj de Tolstoj al nekonato reviviĝis en mil leteroj de Romain Rolland al mil nekonatoj ; hodiaŭ en la mondo estas semataj nenombreblaj grajnoj devenantaj ĉiuj el tiu ununura semo de boneco.* »

Cl.- La vidvino de Romain Rolland, kiu ĉeestis la inaŭguron de la ekspozicio en La Chaux-de-Fonds, rikoltas nelacigeble la leterojn de sia edzo kaj ilin iom post iom eldonas. Tiel tiuj semoj produktas novajn semojn de boneco.

A.- Vi aŭdis Radio-Svislandon.

Cl.- Claude Gacond kaj Andrée Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-